## Tio Kio Mankas

Preskaŭ ĉio ! Sed aparte raportoj pri la aktivado de Verduloj en diversaj landoj. Nu, ni nun havas membroj en almenaŭ dek kvar landoj, sed dum la unuaj monatoj post la apero de la lasta, laŭ mi sufiĉe stimulema, numero de Aveno, neniu sendis al mi tiajn novaĵojn. Mi esperas ke vi, la kara legantaro, estos pli helpema al la venonta redaktoro. Unu el la grandaj avantaĝoj de Esperanto, kiel bone montris Monato, estas ke ĝi permesas al ni havi surlokajn reprezentantojn. Kie ili estas?

Alia punkto rilate al Monato. Tiu magazino jam aperigis plurajn artikolojn kaj ofte novaĵetojn pri aferoj ekologiaj. Nu kompreneble ne ĉiuj povas aboni ĝin, sed nenio malhelpas ke vi verku ion por ĝi! nia eta bulteno (kiel mi jam plurfoje diris) devas esti alia afero: ligilo inter tiuj kiuj decidis helpi nian planedon per laboro aŭ en aŭ flanke de la novaj verdaj partioj.


Bona novaĵo estas la fakto ke nacia verda kandidato en la verŝajne baldaŭa baloto en Irlando estas ankau la nova prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, s-ino Maire Mullarney. Kiu konas aliajn Esperantistojn kiuj lastatempe sin prezentis kiel kandidatoj aŭ baldaŭ faros tion ?

Artikolo kiun mi ne aperigis estas la respondo de Eŭropa Parlamentano, Paul Staes, al demandaro sendita al li de nia Sekretario plu ol unu jaro. Se vi volas legi lian kritike heziteman tamen ne malsimpatian respondon, skribu al mi.

Lasta afero: ni ja devas havi nacian reprezentanton de AVE en tiuj landoj kie jam ekzistas pluraj memberoj de la asocio. La taskoj de tia homo estas plejparte evidentaj, kaj ili povus esti adaptitaj al la cirkonstancoj de la helpemulo. Kiu do sin proponas? (Skribu al nia sekretario.)

Fine kaj denove, mian pardonpeton pri tiu neadekvata bulteno.

Presita sur Armageddon 100% recikla papero.




# AVENO n° 4

espereble kvaronjara bulteno de la
ASOCIO de VERDULOJ ESPERANTISTAJ



Sekretario: Jean-Claude Thumerelle
Place de la Station 16, 7790 Warneton, Belgio


Redaktoro (intere) de "Aveno": Christopher Fettes
St Columba's College, Dublin 16, Irlando Resp.


Decembro 1986

Karaj Legantoj,

Antaŭ pluraj monatoj mi ricevis por Aveno la artikolon kiu troviĝas sur paĝo 2. Mi ne konas la pseŭdoniman verkiston, "iea iu", kies letero venis el F-47 St Pastour, kaj mi ne scias precize kian efikon li volas ke siaj vortoj havu sur la legantaro; sed mi mem, ricevinte ĝin post peto por helpo pri la eldono de tiu ĉi bulteno, sentis ke ĝi forprenas de mi ĉiun urĝecon pri la apero de estontaj numeroj.

Kiel mi jam indikis en n-ro 3, viaj kotizoj validas ĝis la apero de la (ĉi-tiea) n-ro 4, kaj mi do sentas ke per ĝi mi senŝuldiĝas. Mi kompreneble tre esperas, ja ne dubas, ke nova redaktoro baldaŭ aperos por transpreni la taskon aperigi nian kunligilon. Viaj sinproponoj vi povos fari aŭ al nia Sekretario aŭ al mi - kiu ja ankoraŭ pretas helpi eldoni, sed ne redakti la bultenon.



Mi daŭre opinias ke Esperanto povas multon fari por la Verda Movado, sed iom izolita en Irlando, kie mi nun redaktas ankaŭ la novaĵleteron de Comhaontas Glas, la nacia partio verda, mi sentas min iom for de la plena agado verda kiu okazas en Eŭropo kontinenta. Do, ĝis ! C.F.

## Mi Ne Havas Tempon

Bedaŭrinde tiu esprimo ankoraŭ estas aktuala, tial estas necese, ke ni filozofe esploru ĝin.
Se ni estus filozofoj, ni estus praktike saĝaj kaj trankvil-animaj onioj, kiuj pacience tolerus malfeliĉaĵojn. (P.I.V.) Kiel filozofoj ni do estu praktike saĝaj, sekve ni ne plu uzu malsaĝan esprimon.'Ne havi tempon' signifas, ke ni estas tiom okupataj en la hodiaŭo tiel ke mankas periodoj (daŭroj) por akcepti novajn farendaĵojn. Trookupeco estas hodiaŭa fenomeno. Kiel epidemia malsano ĝi grave influas la pensadon de la oniaro. SE NI VOLAS, tiam ni povas elimini tiun malsanon per nova paradigmo. Necesas do krei la volon al nova paradigmo. Paradigmo estas la pensŝablono. Kiel mondialaj individualistoj, ni nin demandu: 'Ĉu ni pravas, opiniante ke ........'. Ni konsciiĝu, ke trookupado estas homa kreaĵo. Tempoj kaj daŭro estas kosmaj fenomenoj. Ni konsciiĝu, ke ni vivas en eterna hodiaŭo. Post ĉiu mez-nokta nulpunkto ni denove vivas en tago, kiu nomiĝas 'hodiaŭo'. Por ni ĉiuj ĝi komenciĝas per 24 horoj da futuro kaj finiĝos per 24 horoj da pasinto. En ĉiu kvaronhoro ni povas decidi pri kion fari hodiaŭ anstataŭ aŭtomate plenumi taskojn el inta tempo. Trookupeco plej ofte estas rezultato de sklava kutimo. Ekzemple la legado. Abundas da informoj per libroj, gazetoj, ĵurnaloj kaj bultenoj. Tro da ili estas nekonsumata, do estas perdo de materialo kaj energio, krome ĝi estas kontraŭ-ekologia politiko. Sekve ankaŭ pri informado ni serĉu novan vojon (aŭ denove uzu forlasitan vojon), kiu estas konforma al ekologia paradigmo.

U IEA



## NEKROLOGO

Je la 13-a de junio 1986 nia amikino Ruth PAINTNER, kunfondintino de la Asocio de Verduloj Esperantistaj, mortis. Neniam mi forgesos ŝin, ĉar la ekzemplo, kiun ŝi donis, estas neforigeble aŭtentika.

> "Paco komenciĝas sur unu sola seĝo" (Pablo Neruda)
> "Ĉiu viro kaj virino havas la devon kunagadi en la paclaboro. Sankta devo estas, devo de ĉiu bonkora homo, kiu ne estas blinda kaj malsen-siva" (Henri Dunant)

Lastan aŭtunon, iutage preskaŭ meznokte, Ruth telefonis al mi kaj kun voĉo, en kiu miksiĝis ĝojo kaj doloro, energie priatentis min pri la signifo de la porpacaj kaj mal-armadaj proponoj de s-ro Gorbaĉov, kiujn ŝi ĵus antaŭe estis laŭvorte leginta. Kiel malofte antaŭe mi tiumomente kaptis la eldiraĵon de Pablo Neruda. Kaj mi apartmaniere ekkomprenis, ke gravas ne nur la unuopa seĝo, sed same la komenciĝo de la paco sur ĝi.

Komenciĝo por Ruth ĉiam samtempe signifis komenco kaj daŭrigo. Ĉio, kion ŝi en ŝia koro vidis kaj sentis, havis konsekvencojn. Por ŝi mem kaj aliaj. Por mi, ekzemple. Ruth plenklarigis al mi, ke paco laŭ ĝia esenco estas ne politika sistemo. Ĝi ne funkci-as pro si mem. Ĝi funkcias, ĉar niaj koroj tiel volas. Ruth en siaj lastaj jaroj pliiĝe malbone vidis, des pli multe ŝi perceptis. Mi ja bone komprenis, ke eĉ la lumo ne taŭ-gas por niaj okuloj, se niaj koroj tion ne volas. Dankon, Ruth!

Ruth kunfondis la Asocion de Verduloj Esperantistaj (AVE). Dum la fonda aranĝo en Bruselo 1984 mi demandis ŝin, pro kio ŝi tiom engaĝiĝas pri la kombinaĵo de Esperan-to kaj ekologio. Ŝi respondis: "Ĉar mi bezonas tion ĉi... kaj la aliaj..." "Kiuj aliaj?", mi redemandis. Kaj post momento da pripensado ŝi replikis: "Ni diru: la verda mondo... floroj kaj homoj". Nur pli malfrue mi plenkomprenis ekzakte kion ŝi celis. Kiam mi ek-sciis, ke ŝi sola kultive prizorgis grandan ĝardenon sur dekliva grundo en Bavario, mi havis antaŭ miaj okuloj kaj koro plian bazan nocion de ŝia vivo: la vivon mem. Kaj denove mi devis ektravivi, kiel interrilataĵo, kiun mi kiel memkomprenblaĵo estis ella-borinta al mi per logikaj-teoriaj konstruaĵoj, ja reale ekzistas kiel individua formo de homa vivo. Al Ruth estis sunklare, ke la valorsistemo de ekologio helpas al ŝiaj flo-roj vivi kaj al la cetera mondo, kiu estas verda. Kaj Esperanto al ŝi estis parto de la ekologio. Ke Esperanto povas helpi al ŝiaj floroj, al la vivo, vivi estis la plej grava por ŝia vida kaj sensiva koro. Nur post tiuj fundamentaj ekkonoj ŝi pretis ekinteresiĝi pri la organizado de homoj. Mi ne konas pli bonan vojon klarigi, kio estas vivata ekologio. Dankon, Ruth.

Ruth, pli ol al io alia, malfermis niajn korojn al tio, kion nia racio jam delonge estis akceptinta. Priatentadi la tutan realon estu estonte nia plej grava danko al ŝi.

Wolfgang Gunther

# MONDHEJMO

EKOLOGIA CENTRO INTERNACIA

*Mi ne volas florojn sur mia tombo*
*aŭ en iu ajn imaga paradizo,*
*sed dum mia vivo*
*kaj sur nia planedo.*

*Justo*

Same kiel Justo, ni ne volas atendi gis nia morto por havi florojn, nek deziras vivi ĉiam en nehumanaj kondiĉoj. Tial ni serĉas gesamideanojn, kiuj kune kun ni volas konstrui aŭ subteni ekologian hejmon internacian.

Por atingi tiun celon ni fondis asocion, kies statuto aperas sur la dorso de tiu ĉi informilo.

La bazaj principoj de nia projekto estas jenaj:

- Ekologio staras antaŭ financa profito; t.e. naturo estas pli grava ol mono.
- En MH(Mondhejmo) regas frateco, amo kaj racio, kaj ne havas spacon la krueleco, kiu jam speguliĝas en la stulta germana proverbo "ĝojo pro alies malfeliĉo estas la plej granda ĝojo". Ni ne volas nome esti ŝajne feliĉaj je la kosto de aliaj, sed vere feliĉaj kune kun niaj gesamideanoj.
- Ni penos eviti la maljustojn kiujn kutime suferas la virinoj, kaj ni aspiros disdoni la taskojn kaj decidrajtojn ĉiam duone inter virinoj kaj viroj.
- Sur la tereno de MH rajtos veturi nur nepoluciantaj kaj senbruaj veturiloj, kiel ekzemple bicikloj kaj elektraj aŭtomobiloj. Eksceptoj, nur kiam ili ne estas eviteblaj.
- Ni uzos kiel eble tiel multe nepoluciantajn energifontojn, kiel ekzemple sun- kaj ventenergion.
- Fumi en MH estas konsiderata kiel agresa ago kontraŭ la kunloĝantoj, kontribuaĵo al aermalpurigado kaj damaĝa ekzemplo por la infanoj.
- Ĝenerale, neniu ce ni kulpas pri via malfeliĉo; la responsuloj regas ekstere. Lasu do vian agresemon antaŭ nia pordo kaj estu en nia hejmo pacema, amema kaj aminda.
- Konsciante, ke nuntempe ne ekzistas pli taŭga lingvo ol Esperanto por ludi la rolon de mondlingvo, ni konsideras Esperanton kiel nian oficialan lingvon, instruos ĝin regule kaj subtenos ties disvastigon interalie per kulturaj aranĝoj.



Por subteni finance MH-n povas ekzisti du enspezofontoj: luigado de ĉambroj kaj parceloj, kaj kontribuo de gemecenatoj, finance fortaj geverduloj kaj gepensiuloj, kiuj volas loĝi ĉe ni por longa tempo aŭ por ĉiam.

Klimate kaj geografie, Francio estas konvena lando por starigi nian hejmon. La loko estu neindustria kaj nature bela. Granda bieno kun renovigendaj konstruaĵoj en akvo- kaj laŭeble sunoriĉa regiono estus taŭga.

La kapitalo de la asocio konsistas el la aliĝkotizoj. Minimuma kontribuo: 300 ff. Finance malfortaj simpatiantoj povas grupiĝi sub la nomo de unu el ili kiel responsa membro. Finance fortaj asocianoj bonvolu kontribui per pli alta kotizo. Ĉiu membro ricevos kvitancon pri sia pago, kaj minimume unu fojon jare informilon pri la evoluo kaj financa situacio de la asocio, same kiel enketilon pri gravaj asociaj aferoj. Antaŭ la fino de 1987, la asocio investos la kapitalon por plenumi la unuan celon, kaj esploros la konvenecon transformiĝi en kooperativon. Por depreni monon el la ŝparkonto de la asocio necesas la komuna subskribo de 2 estraranoj.

La jara kotizo estas 20 ff, kiuj la unuan jaron estas entenataj en la aliĝkotizo. Per la jaraj kotizoj kaj poste la interezoj de la kapitalo, la estraro kovros la kurantajn elspezojn por informado, propagando, administrado kaj serĉado de taŭga sidejo. La unua kotizpago validas kiel aliĝdeklaro.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Ekologia Centro Internacia "Mondhejmo" 1986-04

## STATUTO

1- La subskribintoj fondis asocion laŭ la franca leĝo de 1-7-1901.

2- Ĝi havas la nomon "Mondhejmo - Ekologia Centro Internacia".

3- Celoj: 1) Starigi hejmon en Francio por ekologie konsciantaj homoj el ĉiuj landoj.
2) Uzi Esperanton kiel oficialan lingvon de la asocio pro la kono, ke nuntempe ne ekzistas pli taŭga lingvo por la internaciaj rilatoj.
3) Organizi kulturajn aranĝojn kaj pri Esperanto kaj pri la ekologia scienco, same kiel pri ties aplikoj favore al la internacia kompreniĝo.

4- Ĝia provizora sidejo estas jena: ĉe Catherine SAMAIN / 9 avenue de Verdun
F-60200 Compiègne

5- Povas esti membro ĉiu persono, ankaŭ ne-esperantistoj, kiu akceptas ĉi tiun statuton kaj pagas la kotizon.

6- La servoj de la asocio estas rezervataj al ties membroj.

7- La asocio estas administrata de estraro konsistanta el prezidant(in)o, sekretari(in)o kaj kasist(in)o. Ĝis la unua elekto, la estraro konsistas el la subskribintaj membroj. Ĉiujare dum la unua trimestro, oni elektos novan estraron per letera sekreta voĉdonado.

8- La enspezoj de la asocio konsistos - krom eblaj donacoj kaj subvencioj - el la aliĝkotizoj kaj la jaraj kotizoj.

9- Interna regularo fiksos la kvanton de la jaraj kotizoj kaj la aliĝkotizo.

10- Por modifi la statuton aŭ por likvidi la asocion necesas la plimulto de du trionoj, konstatita per letera sekreta referendumo. En okazo de likvido, ĝiaj posedaĵoj estos atribuataj al similcela asocio, aŭ - ĉe manko de tiu ĉi - dividitaj duone inter unu ekologia kaj unu Esperanta asocio, kiuj estos determinataj de la membroj per simpla plimulto en letera sekreta baloto.

Compiègne, la 28-a de marto 1986.

Prezidantino: Catherine SAMAIN
Sekretario kaj kasisto: Aquiles SANZ

## Pri la Filozofio de Henriko George (2)

La kanonoj de impostado laŭ George estis, ke imposto premus kiel eble plej facile sur produktado; ke oni povus kolekti ĝin facile kaj malmultekoste kaj trudi kiel eble plej senpere sur tiuj, kiuj estas intencataj pagi ĝin; ke ĝi estus certa; kaj, ke ĝi trudus egale por ke neniu civitano havu avantaĝon aŭ malavantaĝon kompare kun aliaj.

Impostadoj je la procedoj de produktado faris arte-faritan baron kontraŭ la produktado de riĉeco. Imposto laŭ la valoro de tero ne obstrukcas produktadon. La proprietulo de tero, la pasiva faktoro en produktado, kontribuas nur tion kiun la naturo donis. La aliaj produktas; la ter-proprietulo profitas el ilia produktado.

Krome, imposto je la valoro de tero stimulas ĝian pli intensan uzon. Por ke li pagu la imposton, la proprietulo de loko kiu estas nesufiĉe en rilate al ĝia merkat-valoro, aŭ kiun oni tenas neokupita en la espero de prez-pligrandiĝo estos instigata plibone utiligi la lokon aŭ proponi ĝin al aliaj kiuj faros tiel.

Aliaj impostoj reduktas produktadon; se oni impostas teron ĝi iĝos pli produktiva. Oni povas ricevi la tutan valoron de tero per impostado, kaj la nura efiko estos stimuli industrion kaj kreskigi la produktadon de riĉeco. Mallonge, la tervalora imposto estas la nura imposto kiu havas pozitivan kaj krean efikon, ne negativon kaj detruan efikon.

Oni ne povas kaŝi aŭ forporti teron; oni povas facile certigi pri ĝia valoro; kaj sekve impostado estus pli simpla. Plue, impostoj je aliaj aĵoj plialtigas prezojn per pliigo en la produktad-kosto kaj kontrolado de la provizo, kaj fine portataj de la konsumanto. Sed imposto je tero ne redukas la provizon de tero, ne povas tial plialtigi ĝian prezon, kaj devas estis portata rekte je la proprietuloj de tero.

George okupiĝas ne nur pri la kostoj de necertaj impostoj (evitadoj, procesadoj,ktp; oni kalkulis impost-evitadon ĉiujare -la "nigra ekonomio"- de £350M!) sed ankaŭ pri la efiko je moraloj. Niaj impostaj leĝoj "subpremas honestecon kaj kuraĝigas ~~fraŭdxxx~~ fraŭdon" kaj "disigas la ideon de leĝo for de la koncepto de justeco". Tamen, la imposto de tero posedas la plej altan gradon de certeco ĉar ĝi estus simpla kaj klara kaj oni povus taksi kaj kolekti "kun difiniteco kiu partoprenas de LA NEMOVebla kaj nekaŝebla karaktero de la tero mem".

La valoro de tero, kiu okazas kiel rezulto de la formiĝo de komunumo, pliiĝas per ĝia kreskado, kaj se la komunumo estis subite disigata, tuj malaperus, estas la nura aĵo kiun oni povas juste imposti.



George skribis: "La imposto je tervaloroj estas la plej justa kaj egala el ĉiuj impostoj. Ĝi premas nur je tiuj, kiuj ricevas de la socio apartan kaj valoran profiton, kaj je ili porcie al la profito kiun oni ricevas. Ĝi estas la ricevo je la komunumo, por la uzo de la komunumo, de tiu valoro kiu estas la kreaĵo de la komunumo. Estas la apliko de la komuna posedaĵo al komunaj uzoj. Kiam oni prenas la tutan luprezon por la bezonoj de la komunumo, tiam oni sukcesos atingi la egalecon dekretitan de la naturo. Nenia civitano havos avantaĝon super ia alia civitano krom kiel estas donata laŭ sia diligento, lerteco kaj inteligenteco; kaj ĉiu ricevos tion kion li juste gajnas."

Mi pli frue menciis, ke Selwyn Lloyd diris: "Ĉiaj impostoj estas malamindaj." Ni devus substituti: "Ĉiaj impostoj estas malamindaj krom unu." Ĝi ne estas malaminda ĉar ĝi estas la justa imposto. Ĝi estas la justa imposto ĉar fine, ĝi tute ne estas imposto, sed la kolekto de Socio de sia propra ĝusta enspezo.

La pli aĝa Mirabeau (ĝe la dek-oka jarcento) rangigas la proponon de Quesnay -por substiti unu solan imposton je luprezo (l'impot unique) anstataŭ ĉiuj aliaj impostoj- kiel eltrovo egala en utileco al la elpensaĵo de skribado aŭ la substituado de la uzo de mono anstataŭ interŝanĝo.

Fine, jen ver an historion el la 'Financial Weekly', la 13an de Junio, 1980:

Hispana respublika familio kiu forkuris de la armeoj de Franço por vivi en ekzilo dum la pasintaj kvardek jaroj, ĵus revenis al Hispanujo por postuli la teron kiun ili forlasis en Madrid.

Ili lasis kvin akrejojn de oliv-arboj proksime al la urbego-centro. Ili revenis por trovi, ke ilia "senpretenda parcelo estas nun ĉe la koro de unu el la plej laŭmodaj loĝindaj regionoj" kaj valoras kvin milionojn da pundoj sterlinga.

Dum la foresto de la familio, la forlasita tero "estas neuzita dum lukса loĝeja regiono disvolviĝis ĉirkaŭ ĝi."

Oni disverŝis multan sangon sur ĉi tiujn akreojn, sed kiel dum la plej-multo de militoj, civilaj aŭ alie, kiam paco revenas oni reasertis privatan posedadon de tero.

Oni povas apenaŭ riproĉi la familion pro ĝojo rilate al sia "bonŝanco" aŭ pro la reaserto de siaj "rajtoj" -sed, kia imitinda leciono pri la funkciado de la tertenad-sistemo de moderna homo! Se oni impostis la teron ĉiujare dum la kvindek jaroj je ĝia merkat-valoro kaj oni kalkulis la amasiĝitan ŝuldon je kunmetita interezo, estus malmulto da mono kolekti kiel negajnita pliaĵo.

W.H.Simcock